

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protaktantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa  
W.M. Page, advokato, Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
I. Gili Norta, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank- kaj fabrik-  
direktoro, Kaunas.

N-o 214  
19. 10. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.  
Redaktoro: Robert Kreuz.  
Redakciaj kunlaborantoj:  
H. Jung kaj M. Burtin, L. K.

Administracio:

Horrem b. K8in, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro  
aŭ 0,20 av. fr. por landoj, kies valuto  
sufiĉis maksimume 50%; por ĉiuj aliaj  
landoj 0,08 doi. aŭ 0,25 av. fr.

Anonprezo

po kvadrata-centimetro egalvaloro de  
0,20 av. fr. (de antaŭa pago 0,15 av. fr.),  
es „Internacia Komercio“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

### Skizoj el Novzelando.

Kolonia vivo.

Kiam la unuaj koloniistoj alvenis Novzelandon, postnelonge ili envenigis kuniklojn de Anglujo, por ĝui la pafsperton. Sed bedaŭrinde de tio devenis la plej granda malbeno iam suferita de la kolonio. Ili naskis, kaj multoblighis tiom, ke ili kovris la landon formangante ĉiun kreskaĵon kaj malpermesante al la brutaro sin paŝti. Multaj farmistoj tute ruiniĝis. Por kontraŭstari la kuniklojn, la registaro envenigis putorojn; sed tio ankaŭ estis malbeno. Ili ankaŭ multoblighis, kaj eksterme atakis la ĉasbirdaron kaj la korbirdaron. Fine la registaro starigis „bordojn“ por ĉiu parto de la lando, kies devo estis prizorgi la detruadon de la kunikloj, ĉu pafe, ĉu venene, ĉu elfose, kaj kiuj rajtigis enmeti imposton por la necesa elspezo. Iom post iom la kunikloj jam de longe malplinombriĝis. La ĉiama popola pligrandiĝo efikas, ke la farmbienoj ĉiam malpligrandiĝis, kaj por tio oni povas pli bone kontroli la kuniklojn. Ankaŭ de longe oni jam celis fari iam da profito eĉ el tia malbeno. Oni elsendas milionojn da kuniklaj peltoj, el kiuj estas fabrikataj multaj specoj da „feloj“. Ankaŭ oni enladigas, aŭ frostigas, multe da kunikla viando kaj ĝin elsendas Anglujon. Nun oni povas diri, ke la kunikla malbeno estas efike kontraŭstarata.

La Monto Egmont.

Unu el la plej rimarkindaj montoj en la mondo estas la Monto Egmont en Novzelando. Ĝi estas estingiginta vulkano, alta du mil okcent metrojn. Ĝi kaj la fama Fugijama, en Japanujo, estas la du plej perfektaj montaj konusoj en la mondo, sed Egmont superas la alian, pro tio, ke anstataŭ esti tute ĉirkaŭata per aliaj montoj, unuflanke ĝi levigas tuj el la maro, kaj aliflanke el granda ebenaĵo. Vidate, ĉu de la maro, ĉu de la tero, ĝi estas beleaga.

Pro sia regula deklivo, ĝi estas tre facile grimpebla, kaj estas multe vizitata de turistoj. Oni povas motorveturi ĝis milmetra alteco, kaj poste oni povas atingi la supraĵon en du ĝis tri horoj por labora sed ne tro malfacila promenado.

Ĝiaj flankoj estas kovritaj per belegaj kaj grandegaj ĉiamverdaj arboj. El tiuj la „rata“ ĉiujomere kovrigas per sangruĝaj floroj. La tuta monto estas konservata kiel ŝtatarbaro.

Pro sia proksimeco al la maro, ĝi altiras multe da pluvo, kiu plenigas pli ol cent riverojn kaj riveretojn. El tiuj kelkaj estas uzataj por krei la elektropotencon. Ili fluas hele kaj pure sur laŝiŝonoj kaj entenas arojn da bonegaj trutoj, kies praavojn la koloniistoj envenigis de Anglujo, kaj liberigis en la riveroj.

La tuta ĉirkaŭaĵo de la monto estas tre riĉa kaj produktas grandan kvanton da butero kaj fromaĝo.

La maorioj (novzelandaj indigenoj) multe riverencas la monton, kiun ili nomis „Jaranaki“ kaj pri kiu ili rakontas multajn kuriozajn legendojn.

Kelkaj natur-riĉaĵoj.

La montoj, riveroj kaj lagoj de Novzelando multe taŭgas por krei la hidroelektran potencon. La registaro jam entreprenis la aferon dum kelkaj jaroj, kaj ĝis nun ĝi konstruis, aŭ konstruas, pli ol unu hidroelektron, elĉerpante la akvan potencon, aŭ el lago, aŭ el rivero. Ĝi nun intencas entrepreni unu eĉ pli grandan, kiu laŭespe eeldonos sepdek mil-ĉevalan potencon. Tiu estos starigata eĉ Arapuni, en la aŭklanda provinco, en kiu estas multaj or- kaj karbminejoj, fabrikejoj kaj farmbienoj, produktantaj multe da butero kaj fromaĝo. Estas intencate ke ĉiu farmisto ricevu la potencon por funkciigi sian melkmaŝinon, lumigi sian domon, ktp. Ĉe Arapuni la rivero Waikato, la plej granda en Novze-

lando, falas rapide laŭlonge de fluejo kun altaj, mallarĝaj, kaj krutegaj bordoj. Tie oni baros la riveron per grandega betona digo, por fari lagon longan je dekok mejloj, kaj tie oni starigos la maŝinaron. La kontrakto ĵus estas donita al s-oj Armstrong, Whitworth & Co., la famaj anglaj inĝenieroj, je prezo de miliono cent sepdek kvin miloj da funtoj. Ili estas devigataj plenumi la konstruadon en du jaroj.

Laŭsajne la petrolindustrio estos grava en Novzelando. Dum multe da jaroj la petrolo estis trovata en la Taranaki'a provinco, ĉefe apud la marbordo, sed nur je malgrandaj kvantoj. Ofte oni boris, sed neniam oni sukcesis trovi sufiĉe por valorigi la koston. Nun, esplorinte la landon, usona oleosperimento diras, ke oni ĉiam boris tro proksime al la maro, kaj ke oni devas trovi la oleon eĉ Tarata, enlande je dek mejloj. Oni ĵus kreis kompanion kun duonmilion-funta kapitalo por provi kaj eksploati la aferon eĉ Tarata. Ĉar la speritaj diras, ke la petrolo neniam troviĝos en Aŭstralio, se oni sukcesas en Novzelando, tuj oni havas bonegan vendejon por la produkto.

Spirita vivo.

En Novzelando estas multaj ĵurnaloj kaj gazetoj. Ĉiu granda urbo havas ĵurnalojn preskaŭ

ĉiun konkurson, escepte unu. La vizitataro nomiĝis „La Ĉiuj-nigrujoj“ („All-blacks“), pro la koloro de siaj trikotoj.

C. E. Mackay, Wellington,  
Novzelando.

### Aktuala politiko.

Paneŭropo.

Sub la titolo „Paneŭropo“ aperis en germana lingvo gravega libro, kiu laŭ la enkondukaj vortoj de la verkinto D-o R. Coudenhove-Kalergi, Wien, estas destinita iniciati vastegan movadon, nome la politika-ekonomian unuigon de la eŭropaj ŝtatoj.

Per elokventaj vortoj la aŭtoro elparolas, kion ĉiu bona eŭropano pli-malpli klare scias aŭ sentas, kaj li montras la vojon el la danĝerigo de la nuna ĥaosa stato de la dispecigita Eŭropo. Per la mondmilito Eŭropo perdis la hegemonion en la mondo, por ĉiam; nova milito, neevitebla, se Eŭropo pluenpaŝos sur la hodiaŭa vojo, senfortigos ĝin ĝis sensignifeco kaj malriĉigos ĝin ĝis mizerigo. Sur la tero estiĝis vastegaj, politike kaj ekonomie fortegaj imperioj: Brita Imperio, Rusa Imperio, Usono kiel kerno de Panameriko, Orientazio (Japanujo-Hinujo). Nur Eŭropo restas blinde en malharmonio, senfortigas sin per detruaj militoj kaj malhelpas la ekfloradon de sia ekonomio per nombro de doganlimoj. Tri mortigaj danĝeroj estas por Eŭropo: 1. la memdetruado per milito, 2. la ekonomia supereco de la grandegaj imperioj, precipe de Amerika, 3. la politika konkero per la Rusa Imperio post ties refortigo. Kontraŭ tiuj ĉi tri danĝeroj ekzistas nur unu sola savrimedo: la federacio de la 25 eŭropaj ŝtatoj (escepte de Anglujo kaj Rusujo, ĉar ili apartenas al mondimperio). Kontraŭ la permissita memdetruo helpas nur Paneŭropa Deviga Arbitracio, kontraŭ la ekonomia konkuro de Ameriko helpas nur Paneŭropa Dogana Ligo, kontraŭ la Rusa Danĝero helpas nur Paneŭropa Defenda Kontrakto. Jen nur la kernpunktoj de la problemoj.

Por majstri la lingvajn malfacilaĵojn en la multnacia Paneŭropo, Coudenhove-Kalergi rekomandas devige instrui en ĉiuj lernejoj eŭropaj la anglan lingvon, kiu laŭ liaj vortoj „estas kvazaŭa predestinita natura Esperanto“. Nu, ni esperantistoj konas pli bonan rimedon, ni scias, ke la interlingva lingvo povus esti nur Esperanto. Mi skribis tiucele al la aŭtoro de la libro kaj ricevis la ĝojigan respondon, ke la „Paneŭropa Manifesto“, broŝuro enhavanta la ĉefpensojn de la libro „Paneŭropo“, jam aperis en Esperanto. (Recenzo sekvos. Red.)

Por efektiviĝi la ideon de Paneŭropo, paneŭropa societo estas fondita. La aligo individua aŭ korporacia estas tute senpaga, koiĝo ne ekzistas. Oni povas simple skribi al la sekretario de la „Paneŭropa Unio“, Wien VI, Gumpendorferstr. 86, kaj deklari sian aliĝon.

P. Gießner, Pira.

### Socia vivo.

Laboro de infanoj en Usono.

La Senato de Usono aprobis amendon al la Konstitucio permesantan al la Kongreso (la federacia parlamento) limigi, reguligi aŭ malpermesi la laboron de infanoj malpli aĝaj ol 18 jaroj. La reprezentantaro estis jam aprobinta la amendon. Ĝi devas nun esti transmitata al la individuaj ŝtatoj de la Unuiĝo por konfirmo, kaj la konfirmo de du trionoj el la ŝtatoj estas necesa por fari ĝin efika.

Tiu okazintaĵo signifas la finon de grava stadio en longa batalo por la starigo de unuformeco eĉ usona leĝdono pri la laboro de infanoj. Nuntempe la reguligo de infanlaboro apartenas al la kompetenteco de la individuaj ŝtatoj (48 ŝtatoj kaj la Distrikto de Kolombio). Federacia leĝo farita de Kongreso estas deklarita antaŭkonstigi-

La Monto Egmont en Novzelando.



kompareblajn je la plej bonaj anglaj kaj usonaj, kaj ĉiu kampara urbeo havas sian gazeton eldonatan du ĝis tri fojoj semajne. Sed la plej elstara fakto de la novzelanda ĵurnalismo estas la kvin ĉiusemajnaj gazetoj eldonataj en la urboj Aŭkland, Christchurch, Dunedin kaj New Plymouth. Pro la malfacileco de la kampara poŝservadoĉefe la kamparanoj ilin abonas. Ili enhavas la novaĵojn de la lasta semajno, ĉu enlandaj, ĉu eksterlandaj. Fakte, kvar el ili estas posedataj de la samurbaj ĵurnaloj, kies enhavaĵoj estas represataj en la gazetoj. Krom la novaĵoj, ili enhavas sportaĵojn, politikaĵojn, temojn, historiojn, poezion kaj sinjorinaĵojn. Ili estas tre bone ilustrataj, ĉefe per fotogravuraĵoj. Multaj el tiuj estas elĉerpitaj el la anglaj kaj usonaj gazetoj, sed la plejmulto reprezentas novzelandajn temojn, ĉefe la sportojn, ĉu la ĉevalkonkursojn, ĉu la piedpilkon.

Ĉiu novzelandano estas sportulo. Fakte, unu el la kvin supre nomitaj gazetoj estas tute dediĉita al la sporto. Pro sia etenda abonado, ili tre valoras por la anoncado. Multaj eksterlandaj firmaoj reklamas en ili, ekzemple la motoraj, la fonografaj kaj la medikamentaj. Eksterlandaj firmaoj kunrilatantaj kun Novzelando povus profiti prizorgi la anoncadon en tiuj gazetoj.

Korpa kulturo.

Sendube piedpilkoludo estas la nacia sporto de Novzelando. Elekta ludantaro ĵus forlasis Novzelandon por ludi kontraŭ la ĉefaj kluboj en Anglujo kaj Francujo. Antaŭ dudek jaroj novzelanda piedpilka ludantaro vizitis Anglujon kaj gajnis



tucia, kaj oni proponis, antaŭ dedok monatoj, fari amendon al la Konstitucio elbilitante al la Kongreso legfari pri la afero sendepende de la legdono de la Statoj. La Direktoro de la Internacia Labora Oficejo, dum sia vizito al Usono, atestis antaŭ la Subkomitato de la Senato, al kiu la propono estis transmetita.

Oficialaj raportoj montras ke, en la jaro 1920, pli ol miliono da infanoj de 10 al 15 jaroj estis okupataj en saĝaj laboroj en Usono.

Informservo de la Internacia Labora Oficejo

Scienco.

Arkeologio.

La biblioteko de caro Johano la Terura.

(Komparu ankaŭ artikolon en ET 212.)

La daŭrigotaj elfosadoj en Kremlo de Moskva promesas novan sukceson de arkeologio, ne malpli grandan ol antaŭnelonge sciigita de gazetoj malkovro de faraonaj tomboj en Egiptujo. Rusa landa historiisto Stiellekij jam de multaj jaroj laboris por trovi faman perditan bibliotekon de rusa caro Johano la Terura. La demando pri tiu biblioteko aperis antaŭ 100 jaroj, kiam en komenco de XIX jc. Prof. de Universitato en Derpt (nuna Estonio) Dobelov en iu privata arkivejo trovis titolaron de biblioteko, apartenanta al Johano M. Tiu ĉi titolaro ĝustatempe ne estis publikigita kaj ili perdiĝis. En 1913 jaro Prof. Stiellekij, laborante en arkivejo de Pernov, hazarde trovis tiun ĉi gravegan historian dokumenton, kiu estas por nuna scienco la titolaro de cara biblioteko. La originala titolisto prezentas du-paĝan folion, skribitan per paliginta inko en germana lingvo.

Estas konate de historiistoj, ke Johano la Terura sisteme akaparis ĉ. 800 valorajn librojn, precipe la unikajn ekzemplerojn. Tial estas komprenebla tiu vigla intereso, kiun elmontris la sciencistoj de okcidenta Eŭropo rilate al demando pri eltrovo de Prof. Dobelov.

La eltrovo de tiu titolaro estas tre granda scienca valorajo. Dum multaj jaroj studante la demandon pri biblioteko de Joh. M. Prof. Stiellekij venis al la firma konkludo, konsentata de pluraj aliaj sciencistoj, kiel ekz. Prof. Zabelin, akademiano Sobolevskij kaj Prof. Tremer, speciale veninta el Strassburg en 1891 al Moskva, ke la biblioteko de Johano M. efektive ekzistas kaj konserviĝis tutece kaj bonstate en iu el subterejoj de Kremlo.

En 1914-15 jaroj oni parte faradis elfosadojn en Kremlo sub la muzeo de armiloj. Prof. Stiellekij trovis la duone supersutitajn subterejojn. Oni kredas ke kelkaj el ili estis elfositaj dum tre antikva epoko — preskaŭ la ŝtonepoko. Amaso da aliaj arkivaj dokumentoj pravas la ekzistadon de subterejo dum la epoko de XVIII jc., kiam estas konstruita muzeo de armiloj.

Se oni povos daŭrigi la elfosadojn en Kremlo plej baldaŭ, ili rezultigos unikajn trovotajn, kiu riĉigos la sciencan.

N. Krassovskij (Ufa, Rusl.)

Astronomio.

Kiam la steloj malvarmiĝas.

Nesolvitaj problemoj de la ĉielo.

Scienculoj estas pesintaj la planedojn, la sunon kaj la lunon; ni scias la interspacen de la steloj kies lumo bezonas jarcentojn por atingi nin, kaj

ni povas eĉ precize mezuri la malgrandegan kvanton da varmeko donita de malproksimaj steloj.

Ekzemple, pripensu pri la problemoj de mal-lumaj steloj! Eble vi ne pensis ke tiaj substancoj ekzistis, tamen por ĉiu brila stelo kiun ni vidas en klara nokto devas ekzisti miloj kiuj malvarmiĝis kaj estas nevideblaj. Kvankam ili estas sen-vivaj, ili tamen kuregas en la spaco per fimegiganta rapideco.

Gaso aŭ polvo?

La 2 februaro 1901, elflamegis en la stelaro de Perseus stelo de brileco miregiganta. Komprenble ĝi ne estis nova stelo. Kio vere okazis estis, ke iu de tiuj lumaj steloj aŭ frapis alian, aŭ eble iun de tiuj grandaj gasnuboj kiuj pendas en la spaco. La rezulto estis eksplodo tiel granda kiel ni ne povas imagi.

Ĉituj mallumaj steloj kaj gasnuboj estas inter la plej grandaj enigmoj de la ĉielo. Antaŭ nur tri jaroj holanda scienculo eltrovis misterنون longan 225 260 000 000 000 km (140 000 000 000 000 mejlojn anglajn), kaj duoble tiom da distanco for de la suna sistemo. Ĝi estas eble gaso, aŭ eble polvo. Ni ne scias kaj eble neniam scios.

Leslie.

Fiziko.

Ree la fino de la mondo.

D-o T. F. Wall de la Edgar Allen scienca laborejo ĉe Sheffield (Anglujo) faras eksperimentojn pri la disrompado de la atomo.

Li ne bombardas la atomon per la tielnomata „alfa“ radioj kiel provis Sir Ernest Rutherford, sed penas disŝiri la atomon per forta magneta energio.

Multe da strangaj raportoj disvastiĝis pri la eksperimento, kaj frenezaj leroj pelegantaj la doktoron ne eksplodigi la mondon estas ĉiutage ricevataj de li.

W. R. W., Torquay.

Literaturo.

La Nobel-premiuloj.

En ET n-o 208 mi trovis liston de premiuloj en literaturo, fiziko, kemio kaj medicino. Certe estas interese ricevi liston ankaŭ de pacemuloj. La nobelan pacpremiion eidonas 5 personoj elektitaj de norvega parlamento; ĝi estas ĉirkaŭ 100 000 kr.

1901 Henri Dunant kaj Frédéric Passy (poduone).

1902 Elie Ducommun kaj Albert Gobat (poduone).

1903 Sir William Randal Cremer.

1904 Insituir de Droit International, Belgujo.

1905 Bertha von Suttner.

1906 Theodore Roosevelt.

1907 Ernest Teodoro Moneta kaj Louis Renault (poduone).

1908 Klas Pantus Arnoldson kaj Fredrik Baier (poduone).

1909 Auguste Marie François Beernaert kaj Paul Henri Benjamin Balluet d'Esournelles de Constant de Rebecque.

1910 Internacia pacoficejo en Bern.

1911 Tobias Michael Carel Asser kaj Alfred Hermann Fried.

1912 Elihu Root.

1913 Henri La Fontaine.

1914, 1915, 1916 ne eldonis.

1917 Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco.

1918 ne eldonis.

1919 Woodrow Wilson.

1920 Léon Bourgeois.

1921 Karl Hjalmar Branting kaj Christian Lans-Lange.

1922 Fridtjof Nansen.

1923 ne eldonis.

Fritiof Ahnfeldt, Torskors, Svedujo.

Tekniko.

Nova ventmezurilo.

Prof. de sovetlanda akademio de aerŝiparo, A. N. Vegner, eltrovis novan aparaton, kiun li nomis „ventometro“. Per tiu instrumento oni facile kaj simple dum flugo en aeroplano povas difini rapidecon kaj direkton de la vento, kiel ankaŭ la angulon de deflankigo de aeroplano. La eltrovo havas grandan signifon por aertveturado. Estraro de aerŝiparo aprobis la eltrovaĵon, kiun oni nun fabrikas en sovetlandaj flugmaŝinuzinoj.

H. Frank, Kazanĵ.

La hidraŭlika potenco en Francujo.

La hidraŭlika potenco (t. e. tiu de akvofaloj aŭ riveroj) utiligebla en Francujo estas de 9 milionoj ĉevalfortoj. Eksploatataj estas nun jam 2 400 000. Ĉi tiu cifero estis de 750 000 en 1915, de 900 000 en 1916 kaj de 1 100 000 en 1919, 63% de la utiligata potenco (1 512 000 ĉevalfortoj) servas al la elektra lumo, la resto (880 000 ĉevalfortoj) al la elektrokemia kaj elektrometallurgia industrio.

L. A., Paris.

Statistiko.

Kiom da eksterlandanoj akiris la francan naciecon en 1923?

Laŭ oficiala statistiko akiris la francan naciecon en 1923 20 508 fremduloj, el kiuj laŭ la deveno estas 8 201 italoj, 4 552 belgoj, 2 255 hispanoj, 982 rusoj, 848 svisoj, 650 germanoj, 345 poloj, 277 rumanoj, 275 luksemburganoj, 265 otomanoj, 252 indiĝenoj de Algerio kaj kolonioj, 232 angloj, 221 aŭstroj, 194 germanoj naskitaj en Elzaso-Lotaringo, 99 tunizianoj, 92 grekoj, 75 hotandanoj, 72 hungaroj, 64 marokanoj, 21 ĉeĥoslovakoj, 251 diversaj.

Sporto.

Pri transoceana veturo de „Sowitasgoht 5“.

(V. ET n-oj 145 kaj 145.)

Sisteme, sciema pri la finrezulto de transatlantika velveturo de malgranda (12 m longa) jaĥto „Sowitasgoht 5“, elveturinta la 26. 5. pasintjara el Bregenz (Aŭstrio), mi estis petanta pliajn informojn pri la riskoplena entrepreno. Dank' al afableco de iu aŭstria samideano, mia avokto (ET n-o 175) ne restis vana.

Laŭ ricevita sciĝo, kiun mi konsideras interesa ankaŭ por legantaro de ET, la vojaĝo ne sole celis gajnon de sportistaj lauroj, sed evidente estis unika maniero de elmigro Usonon. Felice alvenint New York'on, la bravaj velistoj vendis sian boaton kaj ekvivis per la ricevita mono ĝis kiam ili estis sufiĉe sciĝovantaj la anglan lingvon kaj sukcesis trovi laboron.

La boatflagon, flirintan al ili super la senfina ondaro de la Atlantiko, la maruloj resendis al la landestro kiel saluton al forlasita hejmlando.

R. L-on, Tallinn.

fandiĝos ree kaj formas zonojn. Dji kaj pli alproksimiĝos la luno al sia viktimo. Fine je distanco de 1,8 teradioj la gravitado de la tero estos pli granda ol la kohero de la luno, do ĝi dispartigos kaj la pecoj falos teren — grandega haŭso. La kerno falos kiel la lastaj pecegoj teren, formante tie eble postekspulindajn ferminojn.

La dissolvigo de la luno forigos samtempe la kaŭzon koncentriginta la akvon ĉe la ekvatoro; tial nun tiu rapidego al la polusoj subakvigante mallongtempe la mezajn regionojn, dum la alia marnivelo ekvatoro malaltiĝos. (La biblia supra kvego kaj la simila tradicioj ĉe la diversaj indiĝenoj unuflanke kaj la tradicio de sudamerikaj montaraj gentoj pri granda marforfluo aliflanke.) Sekvos post tiu mondkatastrofo trankvilo, nova tero aperos. La terglobo ja ricevis tavolon da nova teraĵo. Nova epoko, komence senluna sed eble tre floranta ekestos. Ĉu ĝin vidos ankoraŭ homidoj, kiu scias?

Interese estas ankaŭ, kiel Hörbiger trovas tiom da paraleloj en la Apokalipso. Oite St. Johano diras preskaŭ matematike precize la samon, kiel trovas Hörbiger pri la fenomenoj de tiu finkatastrofo. Ĉu ne verda profeto? Hörbiger tamen faras la strangan konkludon, ke Johano sciigis pri tio el antikvaj skriboj, nun perditaj, kiuj raportis pri la surteriĝo de la antaŭa „luno“. (?)

J. Schmidt, Gamliŭ-Graz.

Radioj de morto.

Prof. D-o D. Reichenstein.

Gazetoj alportas ĉiam pli kaj pli multe da informoj pri nove trovitaj t. n. „radioj de morto“ vekantaj tielplenan imagon pri la karaktero de la venonta milito. Komence oni skribis, ke anglo Grindelle Mathews proponis al la registaro sian eltrovon kiu laŭdire konsistas en tio, ke la radioj de li eltrovitaj povas en granda distanco mortigi vivajn ekzistadojn, bruligi brulojn, kiel ekzemple benzinoj fermitan en rezervujoj de flugantaj aviadiloj kaj fine devigi, el granda distanco, malmalkam flugmaŝinon al la alitero.

Postaj informoj mallargiĝis la amplekson de la kvantito aljuĝataj al tiuj radioj, kaj londona informo akcentis, ke ilia sola ĝis nun konstatita karaktero estas ilia kapableco mortigi en distanco de 13 metroj (anstataŭ kilo metroj) muson kaj ĉesigi agadon de benzina motoro, kio inspiras ideon pri ebleco devigi malmalkam flugmaŝinon al alitero per halligo de ĝia motoro. Kaj malgraŭ tio, ke la angl

La finkatastrofo de la homaro.

(Vidu en ET 158 la artikolon pri Glaci-Kosmogonio. Al la tie indikita literaturo aldonau: W. E. L. U. N. J. E. R. G. A. N. G. de Max Valier. Eld. Natur und Kultur, München 1923.)

Ne fidu je ĝi, la ĉarma, multe glorata nokta akompano de nia tero! Vidu ĝin, ĉu ĝi ne estas kiel Damoklesa glavon, kiu minacas ĉiunmomente falli kaj frakasi nin, la teridion? Ne fidu je ĝia hipokrita rideto. Hörbiger fortritis la unua de la luno la paceman maskon. Eĉ en la okazo, ke li ne estus prava, donite al la akvo kaj glacio tiom gravan rolon en la kosmo, tamen restus netuŝita lia hipotezo pri la trabantigo kaj surteriĝo de la luno, bazita je la media rezisto en la kosmo.

Ni volas koncize priskribi la aluditajn katastrofojn, memoriginte, ke nia luno ne estas la unua trabantino de la tero, sed jam 3-4 antaŭaj „lunoj“ havis la priskribotajn sorton. Ke Hörbiger estas prava, pravas ankaŭ prapantaj paraleloj el la historio, je kiuj ni ĝialoke atengos.

Unufoje la luno jam kaŭzis sur la tero grandajn katastrofojn; estis tiam, kiam ĝi aperis la unuan fojon kiel trabantino sur nia ĉielo. Ne ĉiam ĝi estis trerakompananto, do ekzistis vere senluna tempo; do ne estas senfunda la tradicio, ke la arkadoj vivis en tempo ankoraŭ senluna. Pro la ĉie elikanta media rezisto mallargiĝis la antaŭa planedo Luno sian vojon ĉirkaŭ la suno, alproksimiĝis pli kaj pli al sia najbaro tero. De tiu ĉi adherie ĝi fine fariĝis trabantino. Sed ĉu ni havas pruvojn por tio? Jes. La historio de tiu okazintajo estas skribita en la terkrucon. Per la gravitado de la nova trabantino kuniĝis la akvo (kaj la aero) ĉe la ekvatoro, la maro tie svelis, ĉe la polusoj kontraŭe la marnivelo malaltiĝis. Per tio malaperis la fabela Atlantio, iam floranta lando okcidente de Afriko. Fazio estas, ke la marnivaj bordlinioj de la maro en nordaj kaj sudaj terpartoj troviĝas nun super la nuna marnivelo, en mezaj zonoj egalas kaj ĉe la ekvatoro multe sub la nivelo. Klasika ekzemplo estas por la lasta la enfluejo de la Kongo, kiu havas profundan submaran fluejon (Cañons) nur klarigeblan per pli alta likiĝo de la enfluejo antaŭe. La ŝvelo de la maro ĉe la ekvatoro estis komence multe pli granda ol nun konstatebla, ĉar la malmola terkruco certe ne sekvis tuj, sed nur iom post iom, la novan terformon, kiun postulis la nova forto; la akvo do devis komence kompensi tiun mankon.

Nun nur la tajdo diras al ni, kiun influon la luno havas je nia stelo. Kvankam ŝajne modesta signo la maksimume 6 m alta tajdo efektive jam nun montras, kiun teruran forton la luna efektiviĝos, kiam ĝi venos en planan proksimecon al la tero. Kaj tio okazos. Pro la media rezisto la luna vojo ĉirkaŭ la tero ne povas esti tute ĉirka sed konstante alproksimiĝanta al la tero. (Sama kiel jeitajo faras ne parabolan sed „balistikajn kurbojn.“) Samtempe ĝi laŭ la Kepler-aj leĝoj plirapidigas sian ĉirkaŭirojn. Oni jam fakte konstatas tion, sed respondeciĝis pri tio la malakceladon de la terturniĝo. Cetere pro la mallonga tempo de precizaj mezuradoj oni ne multe povis rimarki ĝis nun. Por plia alproksimiĝo kompreneble pli iĝos la eliranta forto de la luno, altiĝos la tajdo. La akvo kuntrifigos al la ekvatoro zono, la polusoj senakvigigos kaj parte senarigos, sekve de la lasta ekestos glaciempa, ĉar per nur malalta aerantalo la koncentraj terpartoj ne estas sufiĉe sirmilitaj kontraŭ la malvarmejo en la universo. Kiam la luno estos veninta en proksimecon de sep teradioj, ĝi atingos la rapidecon de la terturniĝo, do ĝi rilate lun lokon sur tero estos senmova. Tio signifas nenon alian, ol ke homo en tiu terura epoko estonia vidos la grandegan lunon ĉiam sur la sama loko, post kiam ĝi antaŭe malrapidego sur la ĉielo ĉirkaŭtritis, bezonante jarcentojn por unu ŝajna rondo. Tute senmova ĝi tamen ne estos, ĉar pro la konata malsameco de la luno vojo-ebeno kaj la tera turniĝ-ebeno ĝi faros ĉiutage nord-sudan movon. La akvozone ĉe la ekvatoro en tiu ĉi stato dispartigos por certaj kaŭzoj en du akvomontegojn unu, la zenitmonton, kontraŭe al la luno, la alia for de ĝi, la nadrimonto. Tiu ĉi akvoamasoj nun trifiĝos per la luno ĉiutage en nord-suda direkto tien kaj reen, responde al la lunmovo. Oni imagu la sekvojn, se la tutocanaj akvoamasoj ĉiutage fiteĝos de Cape Town ĝis Kairo kaj returne! Montarojn detruante kaj; aliloke konstruante efikas tiu terura oscilado. Jes, ankaŭ konstruante, ĉar la per akvo transportita silmo post refloso frostiflora formante ĉiamenerie delikate disigitajn tavolojn, kiuj unu sur la alia formas nian tavolon montaron.

Ĉu tiam ankoraŭ povos vivi homoj sur la tero? Certe nur en malgranda spaco inter la akvo kaj la senakvaj, glaciĝintaj regionoj. Sed estas nur la tria akto en la grandioza tragedio. La katastrofo ankoraŭ longe atengos. Post la paso de la „staranta stato“ la luno estos superinta la rapidecon de la terturniĝo; ĝi rekomencos malrapidego sian ĉirkladon sur la ĉielo sed en kontraŭa al la nuna direkto. La akvomontoj ricevos „vostojn“, fine ili kun-



## Aerveturado.

Z. R. 3 (ZR 126) survoje al Usono.

Jam de kelkaj semajnoj la tuta mondo streĉatendas la transatlantikan veturadon de la Zeppelin aerŝipo Z. R. 3 (Z. R. 126). La veturado fine komencis pasintan dimanĉon la 12-10 matene. De Friedrichshafen (Bodensee) la ŝipo superveturis Francujon ĝis la golfo de la Gironde (Bordeaux), poste la bajon de Biscaya, transpasis la Acorajn insulojn kaj direktiĝis je la Bermuda insularo. De tie ĝi pro forta vento flugis norden en direkto al Novlando (Newfoundland). Dum presado de tiu ĉi numero la ŝipo atingis matene je 5 h. M. E. T. la urbon Halifax kaj de tie flugis en la direkto al New York, Baltimore al sia fincelo Lakehurst. En venonta numero ni povos sciigi detalojn pri la veturado.

## Esperanto kaj Katolikaro.

Esperantista agado ĉe la IV-a Internacia Katolika Kongreso, Lugano, 15-20 aŭgusto 1924.

La nunjaran Internacian Katolikan Kongreson en Lugano partoprenis nur malmulte da esperantistoj, tamen la propagando ĉe la multaj ne-esperantistaj kongresanoj estis bonega. Oni aranĝis specialan propagandokonvenon por Esperanto, kaj sekve de la persona invito de l' esperantistoj venis preskaŭ la duono de la kongresanoj. Prezidis D-o Hinsenkamp el Essen (Germ.) kaj Prof. M. Caroli, Italujo, kiuj per siaj paroladoj klare montris la neceson de komuna helplingvo por la internacia katolika agado kaj la neceson subteni la internacian katolikan gazeton „Katolika Mondo.“ Saluti la kunvenon s-o Isella, del. de UEA en Lugano. Diskutado sekvis, ĉe kiu s-oj Kaspar Mayr, ĉefsekretario de Ika, el Zug (Svisujo), Pedrazzini el Locarno (Svisujo), Solzbacher el Honnef (Germ.) kaj ĉefsekretario Sappl el München (Germ.) pledis kun bona sukceso por la uzado de Esperanto je la servo de la internacia katolikaro.

En la junula konferenco, kiun prezidis Prof. Flajollet el Tourcoing (Franc.) kaj ĉefsekretario Sappl, oni ankaŭ parolis pri la lingvaj malfacilaĵoj, kiuj malhelpas la laborojn de Mondjunularo Katolika (Moka, junulara kaj aktivista grupo de Ika), kiu tion jam ekkonis ĉe sia fondo kaj pro tio ankaŭ enprogramegis la uzadon kaj propagadon de Esperanto. Ĉefsekr. Sappl kaj komitatano Solzbacher multe pledis por Esperanto. Fine oni denove elektis kiel oficialan organon „Katolika Mondo“ kaj akceptis rezolucion enhavantan t. a.: Grava ilo por la sukceso estas sistema eduka kaj kleriga laboro en la grupoj, kies speciala devo estas la lernado kaj praktikado de Esperanto, kiu estas nepre necesa por nia laboro.

Ĉe interna kunveno de la esperantistoj oni elektis komitaton, kiu klopodu plifortigi la esperantistan influon ĉe Ika. Estas elektitaj s-oj Prof. Caroli, D-o Hinsenkamp, pastro Luthĉ (Holando) kaj ĉefsekr. Sappl. W. S.

## Vegetarismo.

Internacia Festago en Nederlando.

Okaze de la 2-a Internacia Vegetara Festago la nederlandaj vegetaranoj kunvenis la 14 sept. en bela loko apud Haarlem. Kvankam la vetero

registraro oficiale komunikis, ke la eksperimentado de tiuj motoroj ne donis rezultaton, kiu devigus registaron aĉeti la eltrovon, tamen la reprezentantoj de tri anglaj financaj grupoj igis eldoni ĵuĝistan malmalfermon vendi ĝin en Francujo, kiam la eltrovinto tien forveturis.

Ĉar pri ĉi tiuj misteraj radioj oni plej ofte parolas en interrilato kun ondoj de la sendanta telegrafio, estos bone diri kelkajn vortojn pri tio, ĉu estas eble uzi elektrajn radiojn kiel radiaĵojn de morto.

Se ordinara elektra arklampo brulas per alterna fluo, la elektra energio irakuranta arkon ŝanĝiĝas en varm-energio. Se nombro de ŝanĝoj de fluodirekto je tempo unu ĉiam pli multiĝas, oni povas konstati, ke ju pli grandiga la forto de la fluo, des malpli da energio konsumas la lumigo de la lampo, kaj male ĉiam pli granda parto de energio forkuras en la spaco apartigante de la metaloj kondukiloj, kaj difuziĝas en ĝi kiel elektraj ondoj. Por kapli tiun ĉi elektrajn ondojn oni ne havas tian naturan organon, kia estas okulo por la lumaj ondoj. Sed se oni starigas en kilometra distanco de loko, kie estiĝas la elektraj ondoj, aparaton kapablan ekkapli ilin, oni povas konstati ilin nur kiel elektrajn intermitajn fluojn de granda tensio. Elektra fluo de granda tensio ne havas fiziologian efikon kaj povas sendanĝere trafluadi la vivan organismon, kvankam la fluo de malalta tensio ĉe la sama intenso kaŭzas morton de la vivanta organismo. La elektraj ondoj ne estas do danĝeraj por vivantaj organismoj.

Plue estas grave respondi la demandojn, ĉu estas eble per elektraj ondoj transporti sendrate kaj ekonomie energion al iu distanco, simile kiel oni ĝin transportas per longaj kabloj, ekz. ĉu estas eble en unu urbo starigi aparaton elsendanta elektrajn ondojn kaj en alia per tiu sama elektra energio movigi motorojn, lumigadi urbon ktp. Je tiu demando estas preciza respondado „ne“. La kaŭzo estas, ke de la loko ĉe sia kreigo la elektraj ondoj disvastiĝas tra la spaco globoforme, per kio la energio forie malkreskas kun kresko de malproksimeco.

La grandaj stacioj de sendrata telegrafio dissendas dum telegrafado kelkcentojn da kilovatoj, sed en distanco de kelkcentoj da kilometroj la akcepta stacio ricevas nur centmilionon de unu kilovato. Tiu ĉi energio estas tiom ege malgranda, ke, por ke ĝi povu akcepti la elsenditan telegramon, ĝi devas esti plifortigata per forto de la energio el la akcepta stacio.

estis pluvema, ni tamen la tutan tagon restis en la kamparo. Felice la suno esis tiel afabla brili posttagmeze, tiel ke ni povis ĝui ĝiajn fortigajn radiojn.

Ĉar la tago havis internacian karakteron, la Nederl. Vegetara Ligo eldonis du vegetarajn kantojn en Esperanto. Unu estas la traduko de la ned. veg. kanto de Felix Orih, la dua originale verkita de subskribinto. La muzikon de ambaŭ kantoj komponis nia prezidanto, s-o Prof. Hugo Nolthemus, el Laren, tre konata en la muzikmondo. La kantoj estos haveblaj ĉe „Nederl. Veg. Bond“, Amstellaan 20<sup>th</sup>, Amsterdam, Nederl. Prezo po fl. 0,10.

El Germanujo, Danujo, Estonujo kaj Anglujo venis salutesprimoj de la diversaj naciaj sekretarioj de „Vegetarano“. Koran dankon al la sendintoj! Ke ĉiuj vegetaranoj en la mondo lernu Esperanton por ke ni ĉiom pli multe povu interrilati unu kun la alia.

Catharina J. Roskes-Dirksen, sekretariino por Nederlando de la Int. Veg. Ligo.

## Kvina Aŭstralazia Esperanto-Kongreso en Melbourne Pasko 1925.

La felice laboro aranĝi la kvinan Aŭstralazian Esperanto Kongreson falas sur la ŝultroj de la Melbourne-anoj, Kvankam ĝi okazos nur paskon de la venonta jaro, vigla agado jam vidiĝas. Kelktagan volaĝon multaj samideanoj devos fari por ĉeesti kaj tial frua informo estas necesa. Ĉar la plej multaj esperantistoj loĝas en Melbourne, verŝajne la kongreso estos granda sukceso.

Se alilandaj semideanoj vizituz Aŭstralion dum 1925, ni petas ilin partopreni nian kvinan. La sekretario s-o Roy R. Rawson, 212 Swanston St., Melbourne, estas volonte preta, detale informi pri la kongrespreparoj ktp.

R. R. R., Melbourne.

## Radio.

Represo en nacilingvaj radio-gazetoj nepre rekomendata!

Novaj sukcesoj en Germanujo.

Hamburg.

Ni erare sciigis, ke tiu stacio ĉiutage aŭdigos Esperanton. S-o Minor L. K. sciigis nin, ke ĝis nun estas intencate nur paroli unufoje ĉiusemajne. Detaloj sekvas ankoraŭ. La unua disaŭdigado okazis la 15. 10 p.m. 5.30 h. pri la temo „La rondsensdostacio de Hamburg“. Pri pliaj paroladoj ni informos ankoraŭ.

Leipzig.

De post 2 semajnoj la sendostacio de Leipzig aranĝis Esperanto-kurson. En venonta numero ni esperas povu doni pli detalajn informojn.

München.

Ankaŭ tiu ĉi stacio starigos Esperanto-kurson, kiu komencis jaŭdon la 16. 10., 5.30 h. p.m. Instruanto estas s-o H. Koch.

Frankfurt a. M.

La esp. lecionaro daŭras ankoraŭ. Estas interese, ke samideanoj el Bengifors en Svedujo skribis al la stacio, sciigante, ke ili bonege aŭdas la lecionojn ĉiusemajnajn kaj speciale konstatis la bonegan aŭdeblan de l' sono „r“ neniam konfuz- ebla kun alia konsonanto.

El tio rezultas, ke funkciigo de motoro per elektraj ondoj je distanco estas ebla nur, se per konvena aparato estas akceptataj en la sistemo aliaj elektraj ondoj. Tiu ĉi aktiveco de elektraj ondoj oni povus nomi reproduktado.

Tio, kion oni konas el la ĵurnaloj pri la provoj de la angla eltrovinto, vekas penson, ke la celo estas mal- ebligigi estiĝon de elektra sparko, bezonata por ek- bruligo de la eksploda miksaĵo de niaj benzinaj motoroj. Efektive ekzistas radioj, kiuj povas havi tian efikon; forta radioaktiva preparato povas per sia „gamma“-radioj (ili estas per siaj proprecoj identaj kun tiuj de Röntgen estig- antaj en tubetoj de alta malsarĝigo per altensia fluo) fari el la ĉirkaŭa gaso medio tiel fortan kondukilon de elektro, ke la elektra sparko, kiu devas estiĝi inter du punktoj, ne kreiĝas — jam pro tio ne, ke elektra malsarĝigo ne okazas en rekta linio kuniganta tiujn punktojn, sed glob- forme inter tiuj punktoj.

Por imagi, kiom tiuj ĉi gamma-radioj kapablas trapreniti, sufiĉas ekmemori, ke la ceesto de tiuj radioj, emanataj de preparato 30 mg. da radiumo, povas esti ankoraŭ konstata, kiam ili traprenis feran platan 30 cm dik. Kaj por ke tiuj radioj estu duone absorbita: per aero estas bezone, ke ili trapasu en ĝi distancon de 115 metroj.

El tio rezultas, ke ne estas necese nei la eblecon, ke la gamma-radioj dum efikado de forta Röntgen-tubeto trapeneirinte metalan platon de cilindro, en kiu elektra sparko ekbruligas la eksplodan miksaĵon de benzina motoro, mal- helpas la kreiĝon de la sparko, kio kaŭzas haligon de motoro. Sendube la eksperimentoj de la angla eltrovinto iras tiudirekte.

Sed tamen ni devas aldoni, ke mi ne konsideras ebla, ke tiuj eksperimentoj havus palpelban konsekvencon por la milita tekniko. Unue pro tio, ke sukcespliaj ili povas esti nur tiam, se ili uziĝas en sufiĉe mallonga distanco, ĉar kun kvadrato de distanco ili malmultiĝas, kiel ĉiuj specoj de radioj (kaj krom absorbiĝas de la medio), due pro tio ke, akatit en mallonga distanco 30-40 m estas bezone uzadi aparatojn de kolosa grandeco. Kaj trie pro tio, ke oni povas antaŭe juĝi, kiel devas esti ŝanĝita la aparato, donanta la sparkon en la flugmaŝina motoro, por ke la gamma-radioj ne povu malhelpi la kreiĝon de la sparko.

El la ĉeĥa gazeto „Národní Listy“  
Mila Vokrálová.

## Filatelio.

Unua Tutmonda Konstituanta Kongreso de Filatelista Internacio.

Unua Tutmonda Konstituanta Kongreso de Filatelista Internacio okazos en SSSR en Moskva la 1 jan. 1925 tuj post fermo de Tuisovetunia Kongreso de Tuirusia Filatelista Societo kaj dum funkciado de Unua Tuisovetunia Ekspozicio pri filatelio, papermonkolektado kaj numismatiko.

Partopreni la Kongreson de Filatelista Internacio estas invitataj reprezentantoj de ĉiulandaj filatelistaj societoj (ne komercistaj), ankaŭ apartaj neorganizitaj filatelistoj de ĉiuj landoj; al kvin reprezentantoj de ĉiu societo kaj al la sama kvanto da neorganizitaj kolektantoj de ĉiu lando estas donata la rajto de decida voĉdono.

La tagordo de la Kongreso kaj aliaj detaloj pri la Kongreso kaj pri enveturo en SSSR estas publikigitaj en n-o 1 de „Radio de Filintern“, kiu estas sendata de Org. Kom. post ricevo de 0,30 \$ (oni povas sendi la egalvaloran sumon de puraj cirkulantaj poŝtmarkoj).

Adreso: Organiza Komitato de Filintern, Moskva, SSSR, 1-a Tverskaja-Jamskaja 3.

## Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciigojn (sur poŝtkartoj aŭ aparta folieto unuflekse skribita, sed ne inter administraciuj aŭ privataj sciigoj) pri ĉiu novaĵo el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

Belgiujo.

Antwerpen. La „Sezono Esperantista“ plej vigle komenciĝis. La grupo „La Verda Stelo“ anoncas sian kutimajn kvin kursojn por komencantoj kaj unu por pli-progresintoj. Propagando estas farata per grandkvanta dissendo de cirkuleroj kaj per elmetado de grandaj afiŝoj en la urbo. Speciala loka „Propaganda Komitato“ entreprenis energian propagadon por la vesperaj kursoj organizotaj de la urbestro. Tiu komitato ankaŭ laboris per cirkuleroj kaj gluardo de plaĉa afiŝo sur la fasado de ĉiu komuna lernejo. Krom tio ĝi organizis esperantistan ekspozicion en la montra fenestro de la oficiala urba informejo, kiu precipe pro ĝia centra lokigo — sur la ĉefa strato — ekvekas la interesecon de grandnombra publiko.

Fr. Sch.

Italujo.

Milano. Dimanĉon, 5. 10. okazis ĝenerala kunveno de la membraro de Regiona Lombardia Instituto de Esperanto, por voĉdoni la jaran raporton de la sekretario, kaj elektii novan estraron. Post longa parolado de s-o Piatii, sekretario, la raporto estis aprokata unuanime. La instituto, pere de la membroj s-oj Cantorini, Facchi, Morfini, Giolla, Piatii, Carbone, Zanetta, Cazzola, Quarone, Mainardi, Secchi, Lazzari mallerms en Lombardio (urboj: Milano, Voghera, Mantova, Cremona; Brescia) 10 unuagradajn kursojn, 2 duagradajn, 1 triagradan, kaj sukcesis ricevi helpon de la milana urbestro.

Post longa diskutado la kunvenintoj per ĝenerala akklamo reelektis ges-ojn D-o Filippetti (direktoro), Prof. Rota (vic-direktoro), Prof. Piatii (sekr.), D-o Monti, kav. Prof. Nobile, Prof-ino Comolli, s-o Mainardi (konsilantoj), kiel novan estraron ĝis septembro 1925.

Jugoslavio.

Dalmacio.

Grohote. Ne ĉie la movado progresas tiel, kiel en malgranda vilaĝo Grohote sur insulo Solta (1500 loĝantoj), kie ekzistas jam ĉ. 30 bonaj samideanoj. La sukceso de la Dua Sudslava Kongreso en Solit entuziasmiĝis ilin, kaj ili nun per novaj fortoj plue propagandas. Amuzo aranĝita de la loka Esp. Klubo la 30 sept. tre bone sukcesis. Paroladis s-o Rupčić el Solit pri la graveco de Esp. Sekvis komedio, en kiu montris sian aktoran talenton gesam- ideanoj Fliŝovi Marija Jerman kaj Tereza Mladinov, s-oj Vladimir Mladinov kaj Jakov Mladinov. En la apudaj vilaĝetoj forta propagando. Komencis kurso en Srednje Selo kun 12 partoprenantoj.

Janjina. Post foriro de nia prezidanto s-o Baselli, el kies levoro ni devas danki la esperantistigon de la tuta duoninsulo Pelješac, ni ne malkuraĝiĝis. La vicprezidanto fliŝo Anka Glavović kaj la agema sekretario s-o Ante Marinović iniciatis novan movadon, kies fruktoj jam vidi- ebligas. La 7 sept. okazis amuzvespero de ĉi tiea Esp. Klubo kun parolado de s-o D-o Ivanović kaj deklamado de fliŝo A. Glavović. Oni ludis komedieton. La partoprenoj kaj la sukceso tre bonaj.

Metković. La brava prezidanto de la klubo en Janjina s-o Dinko Baselli troviĝas nun ĉi tie kiel komun- una sekretario. Multajn novajn adeptojn li trovis kaj malfermos baldaŭ kurson, post kio sekvos starigo de klubo. Hoielo „Central“ abonas ET.

Split. La brila sukceso de la Dua havas fortan eĥon en Dalmacio. La raporto de redaktoro Teo Jung pri nia lando tre bone elfikis. La nacia gazetaro ofte priparolis la impresojn de s-o Jung kaj sendube ili ankoraŭ longe elfikos kiel bona propagandio por Esperanto kaj samtempo per la ĉarmoj de Dalmacio. La ĵurnalo „Novo Doba“ publikigis leteron de s-o L. Courinart, franca samideano partopren- inta en ĉi tiu, al D-o Rečić pri la rava panoramo de sur monto Marjan.

## Diversaĵoj.

La riĉaĵoj de Paris.

La parisa urba administracio starigas la inventarion de la urba posedadoj, kies valoro estas 3 miliardoj 854 milionoj. Inter ili la urbdomo valoras 31 800 000 frankojn, la Haloj (parisa kovri- ĵaŭburaĵo konstruita en 1860) 50 770 000 fl., la urba buĉejo de la Vilette 33 milionoj, la parko Monceau 25 milionoj.

Virinoj-inĝenieroj en Francujo.

La Centra Lernejo de Paris (supera inĝeniera lernejo) donis la diplomon de inĝeniero de arto kaj manufaktoj al du virinoj: fraŭlinoj Pazerac de Forges (la 12-a je 266 studentoj) kaj Burgaz (la 21-a). Ili estas la unuaj virinoj finintaj kun diplomo ĉi tiun gravan lernejon.



### Saksa Ligo.

Invito al la unua kunveno dimanĉe la 2 nov. 1924 matene je la 11a en la „Meistereck“, Chemnitz, Rathenaustr.

Tagordo.

1. Raporto pri la celoj de la Ligoj.
2. Diskuto pri la revivigo de la Saksa Ligo.
3. Elektioj.
4. Diversaj aferoj.

Ĉiuj saksoj grupoj kaj izoluloj estas kore invitataj. Tiuj el ili, kiuj legos tiun ĉi inviton, estos insiste petataj scigi tion al la subskribanto, por ke li, jam sufiĉe okupita, ne plu sendu al ili specialan inviton. Samtempe ili komuniku al ni, kiom da gesamideanoj el ilia urbo venos al Chemnitz kaj kiam ili alvenos, por ke oni akceptu ilin solene je la stacidomo. Kelkaj gesamideanoj venos jam jaŭde, por ekskursi vendrede (saksa festtago — 31 oktobro) kaj sabato en la ĉirkaŭaĵon (al la Fichtelberg, al Augustusburg, Einsiedel ktp.) gvidotaj de la chemnitaj gesamideanoj. Ni tre volonte prizorgos ankaŭ ne-multekostajn noktestadejojn.

Al la gesamideanoj en Turingio kaj la provinco Saksujo.

Oni proponis, ke la denove revivigota Saksa Ligo ankaŭ ampleksu la nomitajn teritoriojn aŭ partojn de ili. Grupoj kaj izoluloj el tiuj regionoj, kiuj konsentas, estu kore invitataj kaj petataj doni al la subskribanto la supre deziratajn scigojn.

Por la prepara komisiono: Urba iura konsilisto Feder, Chemnitz, Andréstr. 41.

### Alvokoj.

Internacia Florekspozicio en Heemstede (apud Haarlem, Holando).

En la printempo de 1925 (marto—majo) okazos en Heemstede internacia florekspozicio. Eksterlandaj esperantistoj, kiuj intencas viziti la ekspozicion, bonvolu sin direkti al nia delegito s-o J. H. W. Høbermehl, Kinderhuissingel 30, Haarlem. Li zorgos, ke la vizitintoj estos akceptataj ĉe la stacidomo en Haarlem kaj estos kondukataj al kaj en Heemstede kaj la ekspozicio.

Por fari propagandon por nia lingvo, oni petas la esperantistojn eksterlandajn, demandi de la estraro de la ekspozicio informojn esperantlingve. La adreso estas: Tentoonstellingscommissie, Intern. Bloementoonstelling, Heemstede, Holando.

### Rusa-Esperanta Vortaro.

Mi verkis rusa-esperantan vortaron, kiun tre bezonas niaj rusaj esperantistoj. Mi verkadis ĝin dum unu kaj duono da jaroj. Mi ne serĉas ian profiton, sed mi eldonos ĝin, se mi ne estus fuginto for de mia patrujo, do se mi havus necesan monon.

Mi oferas mian laboron al la komuna afero kaj turnas min al samideanoj pli riĉaj ol mi. Eble iu el vi povos eldoni tiun ĉi vortaron je sia el-kaj enspezo. Post serioza propono mi tuj ekspedos la vortaron (ĉirkaŭ 7000 vortoj).

M. Solovjev, del. UEA, en Petrovradin, Srem, Jugoslavio.

### Bibliografio.

La Tragedio de l' Homo. De Emeriko Madách. Kun 20 desegnoj kaj portreto de l' aŭtoro. Tradukita kaj klarigita K. Kalocsay. 287 + XXIV paĝoj, 15 + 20 cent. Diversaj prezoj laŭ kvalito: simpla 0.80 dolaro, luksa 1.20 dolaro. Mendebla ĉe Hungara Esp. Instituto, Budapeŝt VI, Eötvös-u. 5.

Hungara Esp. Instituto eldonis libron, kiu meritas la specialan atenton de ĉiuj literaturamantoj. Mi ne troigas dirante, ke ĝi estas la plej bela libro nuntempe ekirebla en la Esperanto-literaturo, laŭ sia enhavo kaj laŭ sia aranĝo.

La libro priskribas la Tragedion de l' Homo. Adamo estas — kiel klarigas la tradukinto — felica en la Paradizo, sed dependa kaj senscia. Li volas scii kaj stari sur propraj piedoj. Sed li tuj konscias pri sia malforteco; li vidas, kiel lia karno perdis kvazaŭ polvo en la universo. Kian rezulton, kiam celon atingos ĉi tiu malforta homo en la batalo de vivo, sed la senkompataj leĝoj de la naturo, prenata de sia malperfekteco. Lucifer malhele profetas „celon sencelan, lukton tre kruelan“ kun pala, falsa esparadieto. Adamo vidas tragedion en sia sonĝo.

Nune li vidas sin faraono gloravida kaj tirana; sed la amo inspiras al li humanecon. Li volas, ke lia gloramo kaj nobla ambicio uliu al la Komuno. Lucifero kondukas lin al Ateno, kie Adamo en la persono de Militades aperas senluziga — maldankemon de la popolo. Nun li serĉas forgeson en plezuraj. Li troigas en Romo, vivas la vivon de diobulo kaj festas orgiojn. Kompreneble tio ne kontentigas lin.

Aperas la Krucoj. Kaj Adamo „ekiras por fariĝi heroo de l' krucoj kaj por serĉi la novan, kavaliran virindecon“. Li estas Tankredo, batalas je la kapo de krucarmeo, sed — reveninte el la milito — ekonas, ke „la kristanismo konstruis novajn murojn inter homo kaj homo: la diferencan inter kavaliraro kaj popolo“. Cetere la popolon malpli interesas la kruccruĉiloj ol la teologiaj disputoj. Li ekamas fraŭlinojn, sed „antaŭjuĝo kaj fuŝo de l' naturo kaj religia sento disigas ilin por eterne“.

Post tiu nova senluziĝo Adamo serĉas ripozon en scienco kaj familia vivo. Kiel fama preĝo li vivas ĉe la kortego de imperiestro Rudolfo en Praha. Sed lia edzino estas malfidela kaj la sciencojn li devas korpuri por vivinti sin. Li revas pri nova penso, kiu renovigas la hom-

aron. Li vidas sin en sonĝo kiel Danton, unu el la gvidantoj de la franca revolucio, kiu tamen la blinda popolo fine kondannas, same kiel ĝi kondamnis antaŭe la aristokratojn. Adamo tre veĝigas kiel Kepler. Sed li ekonas, ke la vivon oni ne povas enfermi en sistemon de teorioj, ke ĝi moviĝas laŭ siaj propraj leĝoj, kaj li revas pri senlima libereco al la individuo.

Tiu ĉi kredas esti trovinta en Londono, kie regas la libera konkuro kaj kie ŝajnas ankaŭ regi vivabundo. Sed tiu libera konkuro estas fonto de novaj malbonoj. La popolo malnobliĝis; laboristoj, studentoj, knabinoj ne taŭgas; ario fuŝiĝis; scienco ĉarlatanas por povi vivi.

Denove elrevigite, Adamo nun deziras socion, kie la scienco garterastas kaj laŭ mezurita ordo starigas ĉiun sur lian lokon, difinas kaj egaligas la klopodojn por la bono de l' Tuto. Jen la deziro plenumiĝis. Sed kiel eniga estas tiu unuforma ŝtato de l' malproksima estonteco. Ne homoj, nur numeroj! Ne individuo, sed nur unu granda homa kaĉo. Kaj la scienco devas klopodi por deturi de la Tero la venontan katastrofon, kiu minacas pro malheligo de la suno kaj pro furoro de multaj vibezonaĵoj.

Adamo nun volas tute forlasi la teron; ĉe la limo de l' tera atmosfero tamen li deziras returni, por nova lukto. Sed la scienco vane provis deteni la katastrofon. Tero agnias. Ne estas pli idealoj, grandaj ideoj. Homaro bestifiĝas. Adamo abomenante kaj malesperante petas Luciferon, ke li veku lin kaj finu la teruran sonĝon.

Adamo veĝigas kaj intencas sinmortigon. Jen paŝas al li Evo anoncante, ke ŝi estas naskonta infanon. Adamo sentas vana la batalon kontraŭ la Sinjoro; falante sur la genuojn li petas Lin pri la solvo de liaj turmentaj demandoj: ĉu la animo transvivas la korpon, ĉu la noblaj klopodoj estas rekompencataj, ĉu estas progreso en la historio de l' homaro? La Sinjoro ne respondas liajn demandojn, ĉar pli bone, se Adamo ne scias certe la solvon. Li instigas lin por noblaj penoj kaj promesas al li helpon: entuziasmon kaj peozion, kiu parolos al tra la animo de l' virino. Angela horo laŭdas la bonan agon, kiu sias mem rekompencas. „Nur tiu fin“ — ekkrias ankoraŭ Adamo. La Sinjoro respondas: „Penu, hom, kaj firme fidu!“

Kun granda intereso mi legis la verkon, kvazaŭ mi legus streĉantan romanon. Kaj mirige, min tute ne ĝenis ĝia versa formo, tiel bonstila kaj flua estas la traduko, eĉ en tiuj versoj, kiuj havas rimojn. Do, ne nur Madách kreis per la „Tragedio de l' Homo“ majstroverkon, Kalocsay ankaŭ majstre ĝin interpretis al la tutmonda esperantistaro. Cetere la Antaŭparolo, la Resumo kun klarigoj, la Tabelo de neoficialaj vortoj kaj la Rimarkoj de l' tradukinto forigas la reston de ĉiaj eventualaj neklarigaĵoj.

Dum la legado mi notis kelkajn vortojn, kiuj ŝajnas al mi ne tute korektaj, kaj ankaŭ kelkajn preserarojn, el kiuj la plej gravajn mi citas: p. 24, antaŭlasta linio: disdujgante (legu: disfluigante), p. 122, 7, Fortempojn (Portempajn), p. 158, 18, li (ŝi), 186, 16 sin ambaŭ (pli bone: lin ambaŭ), 186, 18 vesto (veston), X, 55 sin (lin), XII, 11 ŝia (ŝia), XVI, 22 siaj (liaj), sia (li), XVII, 1 sia (lia), XVIII, antaŭlasta linio. Sirio (Asirio), XX, lasta linio, Li (Ŝi). Kelkloke la interpunkcio povus esti pli akurata.

Ĉu la diversaj neologismoj, kiujn la tradukinto uzis, ĉiuj estas necesaj, mi ne volas esplori ĉi tie; kelkaj almenaŭ ŝajnas al mi superflujaj.

Menciinda estas ankoraŭ la ekstera aranĝo de la libro. Kompostajo kaj preso estas tre bonaj. Dudek tupaĝaj arte presitaj ilustraĵoj, krom portreto de Madách, formas unikajn ornamon de la libro. La ilustraĵoj estas reproduktaj de 20 desegnoj de M. Zichy, kiuj troviĝas en la Muzeo de Belaj Artoj en Budapeŝt.

Oni sendis al ni du diversajn recenz-ekzemplerojn: unu estas presita sur luksa papero, kaj la ilustraĵoj estas protektitaj per japanpapelaj folioj; ĉe la dua nur la ilustraĵoj estas presitaj sur luksa papero, kaj mankas en ĝi la japanpapo. Tamen ankaŭ la dua, simpla speco estas valora kaj aĉetinda.

Kion mi devas kritiki, estas la bindo: ĝi difektiĝis jam post legado de kelkaj folioj. Sed tio ne estas grava, ĉar verŝajne ĉi aĉetanto bindigos la libron per nova forta kaj luksa bindo, kiu konvenas al ĝia valora verko. Cetere mi vidas en Vien ankaŭ jam bele binditajn ekzemplerojn, kiuj kompreneble estis iom plimultekostaj.

Resume mi ripetos, kion mi jam anticipis: La Tragedio de l' Homo estas la plej bela libro nuntempe akirebla en la Esperanto-literaturo. Tial mi varme kaj senrezerve rekomendas ĝin. T. J.

Esperanta ludo-kartaro. 54 kartoj eldonitaj de IEL-kartcentro, Budapest (Hung). Kun ludreguloj.

Jam antaŭ la milito iu samideano elpensis novan lud-kartaron, en kiu la kuŝimej kvar „koloroj“ estis anstataŭigitaj per kvinpinta stelo suno, luno kaj tero; sed bedaŭrinde li ne sukcesis eldoni ilin. Nun la IEL-kartcentro aperigis belan lud-kartaron de 54 kartoj, en kiu la „koloroj“ estas anstataŭigitaj per la kvar kontinentoj (po 10 kartoj); krome ekzistas unu Esperanto-karto, 4 Stelo-kartoj, 4 Estro-kartoj unu Aŭstraljo-karto.

La fundamenta penso de la esp. kartludo estas, ke „en batalo de la neklondoj kaj la terpatoj la reprezentantoj de la generala homaro (tutegale kaj rasoj) rapidas en kia aĵo vetero en Hano“ al pacaktarado, kie en ĉi tagparto ili konstante daŭrigas la diplomacian pritraktadon pri la paco.“ La pacoŝtato estas la solidargonta triumfonta Esperanto!“

La kvalito de la kartoj estas bona; la desegnoj (en koloroj nigra, verda, blua, flava, ruĝa, orbrunza) tre akurate kaj plaĉaj.

La formato (7:12 cm) ŝajnas iom granda; ĉe dua eldono oni preferu ŝanĝi ĝin, eble je 7:11 cm.

La uzado de landnomoj estas iom sensistema; oni trovas, ekz., Afganistanujo, Kvatemalo, Nikaragujo, Korelando, Transvalujo. La mallongigaĵo „Ĉek.“ por „Ĉeĥoslovakio“ ne estas korekta.

La ludreguloj devus esti pli klaraj. Mi ne sukcesis, laŭ ili ludi kun miaj konatoj la ludon „Paco“ nek la aliajn ludojn klarigitajn en la ludreguloj; sed mi povis utiligi la esp. kartaron por ludi skaton. Precipe la reguloj de la unua ludo devus esti tute simplaj, por ke oni tute certuĝu al la kartoj; poste povus sekvi pli komplikaj ludoj. Sed, ĉar la esp. ludkartoj estas uzebaj por ĉiuj jam konataj kardludoj: skato, vistro kc., kaj ĉar ilia kvalito estas vere laŭdinda, ili povas servi kiel taŭga propagandilo.

Esperbe la IEL-kartcentro baldaŭ eldonos novajn pli klarajn ludregulojn, komencante per tre simpla ludo kaj daŭrigante per laŭgrade plimalsimpligitaj ludoj. Nur tiu la ideo de la elpensinto de l' esp. kartaro pri originalaj pacifistaj aŭ propagandaj ludoj plene efektiviĝos.

Mi rekomendas la aketon de la esp. ludkartaro al ĉi samideano, precipe al la grupoj. R-ano.

Lehrbuch und vollständige Grammatik der Weltsprache Esperanto mit Illustrationen (Lernolibro kaj plena grammatiko de la mondhelpingo Esperanto kun ilustraĵoj)

von F. C. Richter. Eldono: Laborista Esperanto-Asocio por la germanlingva regiono (G.L.E.A.) Leipzig-Neustadt, Neustädtermarkt 6 III, 15x17 cm, 120 paĝoj.

La kreskanta intereso por nia mondhelpingo nature instigis diskuton pri la instrua metodo kaj aperigas dum la lastaj jaroj gravan nombron da lernolibroj por Esperanto.

La antaŭmilita libro estas skribita por germanoj kaj konsideras precipe la bezonon de tiuj Esperantolernantoj, kiuj volas studi la helpingvon tute sen alilingva scio. Por tio la libro estas uzbebla helpredmo ne nur en la mano de la instruisto, sed ankaŭ por la lernanto, precipe por la lernema laboristo.

Ĝi prezentas la tutan lingvon en 16 lecionoj, de kiuj ĉiu pritraktas unu gramatikan regulon profundigite per skrib- kaj legeokzerkado kaj demandaj frazoj. Laŭ la intuicia metodo instruado estas aldonitaj al la tekstoj kaj plifaciligas esence la studadon. La libro certe estos salutata de la germanaj laboristoj kaj helpos plimulti la nombron de la fervoraj laboristaj esperantistoj.

Hans Dahmen, Horrem.

## Novaj tempoj.

Gazeto de la esperantista instruistaro, propagandas novan pedagogion, per-laboran lernejon kaj per-edukac pacon. Petu specimenon de:

**M. Goldberg, Leipzig-Co.**  
Klemmsstr. 14. Klemmsstr. 14.

## Kio estas S.A.T.

S.A.T. estas organizaĵo celanta meti Esp. je la servo de la proletaro tutmonda

S.A.T. estas perserantaĵo aparato neniel politika

S.A.T. kvankam utilcela, laboristoseva, estas samtempe altideala: ĝi celas krei ĉe siaj membroj sennacian spiritostaton.

Kiajn organojn havas S.A.T. por plenumi tian taskon?

S.A.T. eldonas por plenumi tian taskon monatan revuon, ilustritan kun literatur-scienca aldono:

„Sennaciac Revuo“

(Redakcio: 24 Boulevard Beaumarchais, Paris XI; Administraco: Colmsstr. 1111, Leipzig-Städt., Germanujo)

S.A.T. eldonas per sia Eldonkooperativo gravajn verkojn el kiuj „Faŭst“ de Goethe kaj „Eklummo en Abismo“ de H. Barbuse estas jam aperintaj

S.A.T. eldonas jarlibron, entenanita la adresojn de sia membraro, statistikon pri la laborista movado en la mondo kaj plie diversajn sendaŭdojn.

Kion jam faris S.A.T.?

S.A.T. okazigis 5 kongresojn, kies lasta estis honore prezidata de la fama scienculo A. Einstein

S.A.T. vekis ĉe la esp. laboristaro grandan intereson, veran entuziasmon kaj per tio certigas la sukceson de Esp. en proletaj rondoj.

S.A.T. estas lege enregistrita en Francujo. Detalojn oni petu skribante al la sidejo. Adreso: Sennaciac Asocio Tutmonda, 23 rue Boyer, Paris XX.

## Anoncetoj.

EDZIĜO. La Brava gesamideano en Janjina, l-lino Anka Glevov kaj s-o Dr. Fritz Ziegelbauer, komunuma kurecisto, edziĝis la 18 septembro.

KOOPERATIVULOJ ATENTU! La Torquay Esp. Grupo okazigos kooperativan lertesperon je la 26 novembro. Ĉiu kooperativa grupo eksterlandaj aŭ grupo kunvenanta sub la aŭspicioj de la koop. movado estas petegata sendi lerteron aŭ p.k. menciante la nombron da membroj, kiujn ĝi enhavas. Al ĉiu respondanto estos sendata p. k. de bela Torquay. Adresu: S-o W. R. Wood, 2 Upton Vale Terrace, Torquay. [1]

### Korespondoj kaj Interŝanĝo.

Rusujo. Natalio Viasova, (22-jara fraŭlino), Serdovsk, Saratova Gubernio, Balabolina Str. n-o 6, deziras korespondi pri instruado, moroj kaj vivkutimo. [1]

18-jara hungara fraŭlino deziras korespondi kun la tuta mondo angle, esperante, pri ĉiuj temoj. Preferataj Ameriko, Italujo, Japanujo, Egiptujo. Adreso: F-lino Ida Farnos en Aiud, Rumanujo, Transilvanio. [1]

F-lino deziras korespondi kun gesamideanoj ĉiulandaj per il. PK kaj L. Ĉiam respondos. Adreso: J. Andersons, Kathakalna pagesta, Tiurgas, ĉar Rigu, Latvio. [1]

S-o A. Emödi, Stefania-ut. 16, Budapeŝt, Hungarujo, deziras interŝanĝi PM kun ĉiuj landoj. Sendas il. PK kaj PM. Nepr respondas. [1]

S-o Melchior Dora (Lajos), bei Sear, Alzettestr. 49, Esch-S-Alzette, Luksemburgo, deziras interŝanĝi il. PK (6) PM 50-100, papermonojn ktp. [1]

F-lino Jeorges Teixeira, Pinal-Novoj, Portugalujo, esperantista lernantino, petas al tuta esperantistaro instigi ĝin per poŝtkartoj ilustritaj, esperantoj ktp. [1]

S-o Jorge Teixeira, juna verkisto, Pinal-Novoj, Portugalujo, deziras korespondi kun tutmondaj literaturamantoj, preferate fraŭlinoj. Ĉiam respondos, esperante, latine aŭ france. [1]

Kolektantoj de l' PK! Dezirante pligrandigi mian kolekton mi sendos belegan karton de Germanujo al ĉiu, de kiu mi ricevos karton (bfi) legeble skribitan. Karl Bachmann, Cleve, Rheinland, Germ., Mittelweg 40. [1]

100 diversajn poŝtkartojn de la libera urbo Danzig laŭdeze stampitajn aŭ nestampitajn kontraŭ 5 sv. fk. kaj 1 resp. kup. (por poŝtelspezo) aŭ samvaloro. Tiu ĉi prezo validas nur por 1 monato! Adalbert Noch, Danzig, Johannsgasse 67. [2]

20 novaj esperantistoj, 13-15 jaraj lernantoj en la kvina klaso de la Beskova Lernejo, Stockholm, Svedujo, deziras korespondi kun alilandanoj kaj ŝanĝi gazetojn, pm., pk. il. k. c. Adreso: Rektor Sam Jansen, Stockholm, Svedujo. [2]

S-o Otto Brückner, Herbarstr. 3, Planitz (Sa.), Germanujo, deziras interŝanĝi PK il., L, gazetojn ktp. kun tuta mondo. Respondas nepre. [2]